



BULTENO

DE LA GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Organ der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Numero 1 · Januaro/Februaro 1963

Centra biblioteko de GEFA

Kiel konate, ekzistas ĉe la grupoj kaj distriktoj de GEFA bibliotekoj, pli malpli bone ekipitaj kaj eluzitaj. Ĉiu serioza esperantisto havas tie la okazon profiti de la riĉa Esperantoliteraturo. La estraro de GEFA opiniis necese fondi krom tio centran bibliotekon, kiu laŭ sia strukturo servu al lingvistaj, mov-

adaj kaj specialaj interesoj. Ĉi sube sekvas la listo de la nuntempe disponeblaj libroj. Petojn pri pruntepreno oni direktu al la administranto „Bobv Schiermann, Bahnhof Poppenburg“, Basa 949|852|43. Al viaj mendoj bonvolu indiki la grupliteron kaj kurantan numeron de la dezirata libro.

Librolisto

A — Lerno- kaj studlibroj:

- A / 1 Kurso de Andreo Cseh,
- A / 2 Daŭriga kurso post Cseh-kurso,
- A / 3 Ekzercaj taskoj por daŭrigaj kursoj, (Cseh)
- A / 4 Demonstraciaj tabeloj pri la konstruo de Esperanto, (Serio)
- A / 5 Deutsche Redensarten in Esperanto, (Minor)
- A / 6 Retoriko, (Lapenna)
- A / 7 Esprimo de sentoj en Esperanto, (Privat)
- A / 8 Il Latino Lingua Internazionale, (Agostini) (en itala lingvo)
- A / 9 Plena Gramatiko de Esperanto, (Kalocsay/Waringhien)

B — Vortaroj:

- B / 1 Plena vortaro,
- B / 2 Scienca kaj teknika Terminaro, (Haferkorn)
- B / 3 Enciklopedia vortaro, Esp.-Germ., Parto 1—4, (Wüster)
- B / 4 Marista Terminaro, (Clissold)
- B / 5 Maŝinfaka Esperanto-vortaro, (Wüster)
- B / 6 Matematika Terminaro, (de Beau)
- B / 7 Fervoja Terminaro, (Roshier), el jarlibro 1952,
- B / 8 Wörterbuch, Germ.-Esperanto, (Wingen)

B / 9 Wörterbuch, Esperanto-Germ., (Butin & Sommer)

B / 10 Medicina Vortaro, (Briguet)

C — La Movado (Lingvo kaj Historio):

- C / 1 Leteroj de Lanti,
- C / 2 Leteroj de Zamenhof, I.,
- C / 3 Leteroj de Zamenhof, II.,
- C / 4 Esperanto = Movado, (Stöp-Bowitz)
- C / 5 Fundamenta Krestomatio, (Zamenhof, k. a.),
- C / 6 Historio de la lingvo Esperanto, (Privat)
- C / 7 Historio de SAT,
- C / 8 La internacia lingvo. Faktoj pri Esperanto, (Lapenna)

D — Literaturo (Prozaĵoj):

- D / 1 Pensoj de Zamenhof,
- D / 2 Bofilino, romano, (Karaslavov)
- D / 3 Bulgara Prozo, (div. poetoj)

E — Literaturo (Dramo kaj Poezio):

- E / 1 Esperanta Antologio, (Red. W. Auld)

F — Religio kaj Filozofio:

- F / 1 La Sankta Biblio

Jarkunveno en Parizo

Kiel ĉiujare niaj francaj kolegoj okazigis sian jarkunvenon en Parizo. Ankoraŭ sidante en la trajno, kiu hejmen kondukas min, mi postsentas la agrablajn horojn, travivitajn en la rondo de la francaj geamikoj. Estis duoble interese ĉeesti ĉi-tiun kunvenon, ĉar unuflanke ja necesas kompari la proprajn aferojn kun tiuj de aliaj homoj por trovi sintezon, kaj aliaflanke mi antaŭe legis en la franca „Fervojisto“, ke mia longjara, dumkongresa kundelegitino, fraŭlino Lemonnier, ne plu estis reelektebla en ĉi tiu jarkunveno. Tria kaŭzo eĉ povis esti, ke oni la unuan fojon organizis la kunvenon laŭ alia sistemo, nome, dum sabaton vespere distraj aranĝoj vere ĝojigis kaj amuzigis la ĉeestantojn, la tutan dimanĉon de la naŭa ĝis la kvina horo oni serioze, tre serioze traktis la multflankajn problemojn de la organizo, kvankam — kiel tio povus esti alie en Francio — tri hora tagmeza paŭzo estis dediĉata al flegado de la stomako.

En la distra vespero freŝe bakita orkestro de la pariza nordorienta grupo debute prezentis grandiozan koncerton, i. a. la 999an simfonion de iu fama komponisto „Kukumeto“ en du partoj po 3 sekcioj, kiuj nomiĝis kvinfoje alegro kaj la sesa estis alegreto. Aktive kunagis gejunuloj el ĉiuj grupoj, precipe grava kaj ĝojiga fakto. Sed la certe plej amuziga kaj samtempe plej pripensinda ero de la vespero estis sendube la teatraĵo de

„Joto“ „Grava Kunsido“, kiu en ĉarma maniero pafas kontraŭ diversaj primokindaj kutimoj de „ĉias ajn“ (Esperanto-)societo en ĉies ajn urbo. Dezirinde estus, ke ĉi tiu spirit- kaj spritplena teatraĵo bone prezentita de la laika trupeto „La pipuloj“ (ne la pepuloj, kiuj ja ludis en Münster, kvankam kelkaj el tiuj kunagis), estos ludata en kiel eble plej multaj aranĝaĵoj de la esperantuja vivo.

Mirige kaj mirinde estis, ke dum la tuta dimanĉo relative granda nombro da membroj fidele restis en la salono, sekvante kaj partoprenante la diskutojn de la kunsido, kiu estis la lasta post proks. 15 jaroj prezidita de f-ino Lemonnier. Estas nepre menciinde, ke nur la Internacia Lingvo estis uzata, io, kion ni en niaj germanaj laborkunsidoj ankoraŭ ne atingis. Tamen, kio ne jam estas, povus esti. La internacieco de la kunveno estis substrekata pere de la ĉeesto de la nederlanda kolego Bekker, la belgo Steenhout kaj la IFEF-prezidanto de Jong. Per kortuŝaj vortoj li adiaŭis la eksigantan prezidantinon, donacante al ŝi libraron „la faraono“ kiel agnoskaĵon flanke de IFEF.

Memkompreneble la restado en Parizo kompletigis per agrablaj kunestadoj kun afablaj amikoj kaj per longdaŭra vagado tra la urbo. Resume dirite: Oni certe ne pentas esti partopreninta francan jarkunvenon.

J. Gießner

Pri fremdaj fervojoj

Britio

Sur la linio Fenchurch Street — Upminster — Shoeburyness de la elektrecita trako London Tibury kaj Southand (Orienta Regiono) estas instalita aparato, kiu registras en dekdu diversaj lokoj la tempon de ĉiu traveturinta trajno kaj pluanoncas ĝin al la regadejo en Fenchurch. Tie troviĝas du elektrikaj skribmaŝinoj, kiuj — unu por ĉiu direkto — transferas trajnnumerojn kaj veturtempojn sur faldfoliojn. La faldfolioj estas aŭtomate postliverataj kaj deponataj post la surskribo.

Danlando

Inter la fervojaj administracioj, kiuj uzas Esperanton oficiale en sia horarlibro, troviĝas ankaŭ la Danaj Ŝtatfervojoj (DSB). Ekde la printempo 1962 la

„Danmarks Rejseforbindelser“ enhavas klarigojn de la signoj en Esperanto. Ni gratulas al niaj danaj kolegoj pro ilia sukcesplena laboro.

Grekio

La privataj fervojoj situantaj en la nordokcidenta parto de la lando fariĝis antaŭ nelonge posedado de la Grekaj Ŝtatfervojoj. Ĉiuj grekaj fervojoj — escepte de la elektrecita fervojo Piräus — Athen — Kifissia — formas nuntempe unuon. La normalan ŝpuron (1435 mm) havas 1549 km. 964 km havas ŝpuron de 1000 mm, 23 km tiun de 750 mm kaj 29 km tiun de 600 mm.

Hispanio

Antaŭ dudek jaroj la Hispana Ŝtata Societo de la Fervojoj

(RENFE) konstituiĝis en sia ĝis nun valida formo. Nova leĝo antaŭvidas organizan renovigon. RENFE ricevas per tio la karakteron de memstara societo. Ĝi estas taksata laŭ privatjuraj kaj gvidata laŭ komercaj principoj. La nova administracia konsilantaro ampleksas 12 membrojn. La generaldirektoro estas Carlos Roa Rico.

Svislando

La Svisaj Federaciaj Fervojoj konsentis konstrui novan manovran stacion 15 km okcidente de Zürich, ĉar la estanta ne plu estas pligrandigebla. Supozeble neceso tempodaŭro de minimume 10 jaroj. Pro tio, ke la koncernaj linioj de la stacioj Zürich Altstetten kaj Zürich Oerlikon estas ŝanĝendaj resp. nov-konstruendaj, cetero kun du traka tunelo de 2118 m, la kostoj estos 87 milionoj da svisaj frankoj. W. B.

La vatikana fervojo

La teritorio de la Vatikana Stato estas ligita kun la reto de la Italaj Ŝtatfervojoj per propra fervoja linio. La papo Pius IX inaŭguris en 1863 la linion al Veletri uzante luksan vagonaron. Poste la vatikana stacio servis preskaŭ nur al la vartrafiko. En 1903, antaŭ la forveturo al la elekto de la nova papo, promesis la posta papo Pius X al la urbanoj de Venecia: mi revenos, viva aŭ morta. Tiu promeso plenumiĝis nur post lia morto, kiam lia korpo estis transportata per speciala vagono al Venecia.

La sekvaj papoj pro principo tute ne uzis la fervojon, kvankam la konvencio de 1933 inter la vatikano kaj la itala ŝtato permesis tion. Sole la nuntempa papo Johano XXIII faris escepton en oktobro 1962, kiam antaŭ la komenco de la vatikana koncilio li deziris viziti per la fervojo la preĝejojn de Loreto kaj Asisi. Por la preparlaboroj restis nur 36 horoj. La ŝtatprezidanto d-ro Segni disponigis sian luksan trajnon por la vojaĝo. La trajno konsistis el naŭ vagonoj. En la unua troviĝis la teknika personaro, la dua estis la vagono de la papo, la tria entenis mangosalonon. En la kvara vojaĝis la kurierkardinaloj kiel akompanantoj, en la kvina vagono havis lokon la itala ministroprezidanto Fanfani kaj elstaraj personoj de la registaro. En la sesa ĝis oka vagonoj troviĝis membroj de la vatikano, dum en la naŭa vagono regis la kuiristoj.

Matene, je la 6,34 horo la speciala trajno tirita de du vaporlokomotivoj forlasis la stacidomon de la plej malgranda ŝtato en la mondo. Ĵurnalistoj, televidistoj, fervojistoj, muzikistoj, policistoj kaj aliaj plenigis la kajon kaj la rapide ornamitan halon. Jam post sesminuta veturado estis la unua halto en la roma stacio Travestere. La regi-

stara delegitaro envagoniĝis. La vaporlokomotivoj estis anstataŭataj per elektraĵoj. En Loreto estis la unua oficiala restado. La pluveturo okazis posttagmeze kun la celo Asisi, de kie la reveturado komenciĝis je la 19a horo. La eksterordinara vojaĝo allo-

gis survoje multege da homoj. Ĉie, kie la speciala trajno haltis, la amaso forpuŝis la gardistojn por alproksimiĝi al la papo. Ekz. en Terni kolektiĝis 20 000 homoj. Tra la malgrandaj stacioj oni veturis malrapide. Je la 22 h. la trajno kun la n-ro TR 32 248 revenis al Roma, la „eterna urbo“, kaj je la 22.30 h. finiĝis la unutaga rondvojaĝo de 582 km. W. B.

Ni legis en ...

Auf mehrfachen Wunsch geben wir nochmals die Bezirke bekannt, an die die Esperanto-Zeitschriften nach ihren Herkunftsländern verteilt werden. Interessierte Leser mögen sich an die zuständigen Bezirksbeauftragten wenden.

Hamburg: Belgien, Dänemark, England, Niederlande

Hannover: Frankreich, Jugoslawien, restliche Länder

Nürnberg: China, Finnland, Polen

Regensburg: Schweiz, Spanien, Übersee

Saarbrücken: Italien, Schweden, Ungarn

Wuppertal: Bulgarien, Österreich, Tschechoslowakei

Agado de Esperantistoj en Jihlava (Ĉeĥoslovakio) informas (en okt./dec.) pri la multflanka agado de la tieaj kvar Esperanto-grupoj.

Bulteno, organo de la aŭstria sekcio de IFEF, daŭrigas (en dec.) la donaciston por la projektita Zamenhofmonumento en Linz.

BULTENO de la Esperanto-Societo de Finnlandaj Fervojistoj donas (en n-ro 2/62) suplementajn notojn al la fakprelego de 1960 kaj interese raportas pri la vojaĝo al la IFEF-kongreso en Budapeŝto.

El Popola Ĉinio, eldonita de la Ĉina Esperanto-Ligo, raportas (en n-ro 6) i. a. pri la nuna stato de la ĉina skribreformo kaj informas pri la ceremonioj de geedziĝa festo.

Esperanto en Skotlando, bulteno de la Skota Federacio Esperantista, kritikias (en nov.) per letero de soveta leganto la „neŭtralan“ Esperanto-pozicion, precepte tiun de la poeto Auld.

Fervojisto, organo de la Fervojista Esperantista Rondo Nederlanda, dediĉas (en nov.) du paĝojn al nia jarkunveno en Münster kaj raportas (en dec.) pri la rezultoj de la Zamenhofnomo.

HEROLDO, sendependa gazeto, daŭrigas (en n-ro 18) la serion de la priafrikaj artikoloj de T. Sekelj per „Renkontoj kun la tribo Fuzi-Varzi“.

JEN, eldonita de la Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj, raportas (en

jan.) vaste pri la asocia vivo dum 1962 kaj informas pri la 15a IFEF-kongreso en Britio.

Jugoslavia Fervojisto, organo de la Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistaj, publikigas (en nov.) tradukitan artikolon pri „La aŭtomata kupilo“ ekpitan per multaj skizoj kaj bildoj.

La Fervojisto, organo de la franca IFEF-sekcio, okupiĝas (en n-ro 178) pri la rezultoj de la decembra ĝeneralkunveno kaj apelacias al kunlaboro.

Monda Kulturo, eldonita de UEA unuafoje en aŭtuno 1962, celas publikigi valoran originalan literaturon en Esperanto. Ni rekomendas la ne malkostan abonadon.

En **The Worker Esperantist**, eldonita de la britaj laboristoj, pledas leganto pri la necesa aliĝo de Britio al la Eŭropa Komunumo.

Svisa Fervojisto, bulteno de la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj, okupiĝas (en dec.) pri la modernigo de la IFEF-estraro kaj pri la dua laborplano de UEA. W. B.

IFEF kongresos en majo 1963 en Stoke-on-Trent. Ĉu vi jam aliĝis?

Vorstand und Beauftragte der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

5683

(Stand: Januar 1963)

Vorstand

Vorsitzender: BOI Gießner, Bf Elze/Han,
Basa 949/852/31
Sekretärin: BOS'in Kruse, Sozialamt
Frankfurt, Basa 955/2759
Schriftleiter: BOI Barnickel, Tarifamt
Frankfurt, Basa 955/5601

Sonderbeauftragte

Kassierer: BAmtm Denk, Prüfungsamt
bei der BD Frankfurt, Basa 955/1506
Sprachprüfungen: BAmtm Dr. Lang,
Prüfungsamt bei der BD Frankfurt,
Basa 955/1501
Fachwörtertum: BI Ritterspach, Bf
Heidelberg Hbf, Basa 953/899/222
BULTENO-Versand: BOBw Schiermann,
Bf Poppenburg, Basa 949/852/43

Bezirksbeauftragte

Augsburg: BI Schießl, BA Kempten/
Allg., Basa 964/844/430
Essen: BAmtm Schnetzer, Bf Hamm/
Westf., Basa 944/807/391
Frankfurt: BAmtm Dr. Lang, Prüfungsamt
bei der BD Frankfurt, Basa
955/1501

Hamburg: BOI Lebke, BD Hamburg —
B-Büro —, Basa 947/5444

Hannover: BS Heimlich, Bm Soltau/
Han, Basa 949/850/127

Karlsruhe: BI Hug, BD Karlsruhe
— Ps-Büro —, Basa 953/5005

Kassel: BOI Keil, BD Kassel — Ps-Büro
—, Basa 957/1270

Köln: BS Mester, Bf Rheydt-Geneicken,
Basa 943/882/122

Mainz: Bass Ritthaler, Bf Albisheim,
Basa 854/832/420/3

München: BOS Behr, Bb-Schule Mün-
chen, Basa 962/7563

Münster: tBI Brandenburg, Bm Münster
3, Basa 945/397

Nürnberg: BOI Gößmann, BD Nürnberg
— V-Büro —, Basa 966/5857

Regensburg: tBOI König, AW Weiden,
Basa 965/829/622

Saarbrücken: BOR Winkelhaus, AW
Saarbrücken-Burbach, Basa 956/807/
613

Stuttgart: Prakt Roth, Bm Aulendorf,
Basa 952/835/20

Wuppertal: BI Graß, BD Wuppertal
— T-Büro —, Basa 946/468

F.-I. Sander 945/1252

Nürnberg. Nürnberg havas Esperanto-tradicion, ĉar ĝi estis la lulilo de la Esperanto-movado. Jam en decembro 1888 estis fondita la „Esperantista Klubo Nürnberg“. Ĉi tiu klubo estis la unua Esperanto-organizo ne nur en Germanio, sed en la tuta mondo. La unuan de septembro 1889 aperis en Nürnberg la unua Esperanto-gazeto de la mondo „La Esperantisto“, la gazeto estis redaktata i. a. de d-ro Zamenhof mem.

Estas jam tradicio, ke ni festas la Zamenhofan solenajn ĉiujare kune kun la veterana Esperantogrupon Nürnberg kaj la nordbavara Esperantistaro en la festalongo de la trafikmuzeo Nürnberg en tre inda kadro. La distrikt-komisiito, s-ano Gößmann, aranĝis la feston, kaj la 15an de decembro multaj s-anoj kolektiĝis kiel pacaj batalantoj. Bildo de d-ro Zamenhof, pentrita de s-ano Gg. Winkler, kaj flagoj ornatis la salongon. La festparolanto s-ano Pickel, prezidanto de la „Nordbavara Esperanto-Ligo“ (NOBELO), paroladis pri „Esperanto-Kreato kaj peranto de internacia Kulturo“ (esperantlingve). S-ano Pilhofer (Nürnbergga Esperanto-Informejo) parolis pri „Esperanto in der Praxis“ (germanlingve). La ŝatata deklamartisto s-ano Alexander Starke recitis en Esperanto du fabelojn kaj kantis popolkantojn je la liuto. Kunagis ankaŭ kvarteto de la fervoja orkestro. Tre interesan Esperanto-ekspozicion oni povis admiri. La nova prospekto „... t Germanio per la Federacia Fervojo“ tre plaĉis. Gößmann

El la grupoj

Frankfurt. Pli ol 40 gesamideanoj, fervojistoj kaj membroj de la urba grupo kunvenis la 16an de decembro 1962 en la fervoja kantino por festi la naskiĝtagon de Zamenhof. Enkonduke salutis la komisiito por Esperanto en la fervoja distrikto Frankfurt d-ro Lang. Muzikajoj de piano kaj violono substrekis la specialan karakteron de tiu tago. S-ano Jentsch montris diapozitivojn pri siaj aŭtunaj feriotagoj kiel piedmigranto en la Nigra Arbaro. S-ano Mager donis per aliaj diapozitivoj superferigon pri la ĝis nun eldonitaj poŝtmarkoj kun Esperantomotivoj. Loterio kun premioj el Esperantujo finis la oficialan parton.

Köln. Unuafoje la fervojista Esperantistaro de nia distrikto renkontis al komuna kunveno, kiu okazis la 24. 11. 62 en Rheydt. Triono de niaj membroj partoprenis, eĉ kolegoj loĝantaj en la plej malproksima angulo de nia direkcia distrikto ĉeestis. Post afablaj bonvenigaj vortoj la distrikt-komisiito donis raporton pri la nuna situacio en la GEFA-distrikto Köln. Li ankaŭ alvokis la membrojn, ke ili estonte pli forte kun-

staru kaj kunlaboru ol iam antaŭe. En vigla diskuto la partoprenintoj traktis la organizon, varbadon kaj aliajn ĝenerallajn aferojn en la distrikto. Krome staris sur la programo festparolado de d-ro Lapenna, surbendigitaj salutoj de amikoj el Usono kaj kolora lumbild-prelego pri la IFEF-kongreso en Barcelona. Montriĝis, ke tiaj kunvenoj estas vere necesaj, kaj tial ni intencas kunveni sur distrikta ebena kelkfoje en la jaro. La loka gazetaro kaj la ĉiunonate aperanta broŝuro de la urba trafikoficejo en Rheydt menciis nian distriktan kunvenon.

Nia kolego Kreutz el Stolberg/Rhld. festis la 50an datrevenon de sia esperantistiĝo. Okaze de tiu jubileo la distrikt-komisiito transdonis al la Esperanto-veterano la bondezirojn de GEFA.

Ankaŭ en la pasinta jaro ni denove povis plialtigi nian membronombron. Ĝojige estas, ke dank' al la senlakaĵa klopodoj de s-ano Holzmann ni povis fondi novan studgrupon en Stolberg/Rhld. Per lia intensiva varbado ni gajnis sep adeptojn, el kiuj jam kelkaj aliĝis al IFEF. Mester

Ĉiu GEFA-ano varbu en 1963 unu novan membron!

Anoncoj

Korespondanton deziras: „Jiri Odstrčil, Ĉekyne Nr. 57, okr. Prerov-Morava/Ĉeĥoslovakio“ kaj anoj de la „Esperanto-grupo ĉe Domo de Kulturo, Sihlava/Ĉeĥoslovakio“.

„Bonvenon al DANMARK kaj la danaj junulargastejoj“ nomiĝas kvarpaĝa ilustrita prospekto havebla per „J. Stig Hansen, Lundtofte, Lyngby/Danlando“.

Eisenbahner mit unregelmäßigem Dienst!

Lernen Sie Esperanto zu Hause. Fernlehrgang erhältlich durch „Briefschule G.m.b.H., 6 Frankfurt (Main), Untermainkai 66“.

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Barnickel, 6000 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6. Sekretariat/sekretariejo: Elfriede Kruse, 6000 Frankfurt (Main), Karlstraße 4—6. Vorsitzender/prezidanto: Joachim Gießner, 3210 Elze/Han., Bahnhof. Druck/preso: Limburger Vereinsdruckerei, 6250 Limburg/Lahn.